# Francilia federacio
# KomitatKunsido (KK) 06/12/2024

## Partopreno

- Raymonde Coquisart, (RC) ĉeestas
- Pierre Gauthier, vic-kasisto (PG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar, prezidanto (AK) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) sin ekskuzis
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) ĉeestas
- Sabrina Rusch (SR) malĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) ĉeestas

## Ekde la antaŭa komitatkunsido

- La protokolo de la lasta komitatkunsido 06/09/24 estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj
- 14/09: festo de asocioj de Paris Centre, ĉe la urbodomo, la tutan tagon. Nia asocio havis budon. Deĵoris LPI, AK.
- 13-15/09: Homarfesto, en Brétigny-sur-Orge. La budon pagis Espéranto-France. Organizis AL. Deĵoris AL, Guillaume, Lucien Bresler, Romain, Victor Simonnet, Laurent Vignaud...
- 21/09: malfermaj pordoj, dum la posttagmezo, en nia sidejo. Deĵoris LPI, PG...
- 30/09: unuhora fulmkurso, en nia sidejo. Gvidis DJ.
- Kandidatiĝo al Conseil parisien des associations en oktobro. La lotumado okazis la 23an de oktobro. Mesaĝo ricevita de la urbodomo : ni ne estis elektitaj.
- 15-17/11: salon de l'éducation, en Parc des expositions, Parizo. Espéranto-France pagis 1.590€ttc por la budo (la prezo por firmao estas 6.000€). Organizis PG. Deĵoris PG, LPI, Lucien Bresler, Jérôme Auclair, Laurent Vignaud, Sarah, Romain, Elisabeth Barbay.

## Kursoj

- cours pour débutants en présentiel, jeudi de 19h00 à 20h30, PG, 2 lernantoj
- cours intermédiaire en présentiel, mercredi de 18h30 à 20h, Marianne Pierquin, 4 lernantoj
- cours supérieur (préparer l'examen C2) en présentiel, mardi de 18h30 à 20h00, FLJ, 2 lernantoj

Ĉiu instruisto bonvolu registri sian kurson en la retejon Edukado.net, la loko estu "Parizo", ne "Paris".

Ĉiu instruisto devas peti de siaj lernantoj ke ili aliĝu al Espéranto-France kaj ke ili pagu la kurson.

- Aliĝo

La lernantoj povas aliĝi surloke kun Said aŭ rete https://esperanto-france.org/adherer

La instruisto devas kontroli ke la lernantoj aliĝis (vi povas demandi al LPI aŭ DL aŭ Said ĉu iu lernanto aliĝis aŭ ne al Espéranto-France).

- Pago de la kurso

La lernantoj rekte pagas al la instruisto. La instruisto devas doni al DL la pagon RAPIDEGE por ke li enkasigu ĝin antaŭ la jarfino. Rememoro: la kurso (sen la kotizo) kostas 50€. Duonprezo por senimpostuloj kaj junuloj 25€. La mono iras al nia asocio.

Kursoj ĉe la pariza grupo de SAT-Amikaro 132 boulevard Vincent Auriol okazas posttagmeze, do ne estas konkurenco kun

niaj vesperaj kursoj. Ni informas pri iliaj kursoj. Afiŝo en la sidejo de SAT-Amikaro informas pri niaj kursoj.

# 13/12 Intervjuo

Un journaliste nous invite à son émission *Bienvenue à l'Est*, une émission sur les cultures et les artistes natifs ou originaires d'Europe centrale et orientale, sur *Radio Arts Mada*. L'émission radio télévisée a lieu, en direct, de 19h à 20h30, tous les vendredis. Notre interview durera 15 minutes environ au cours de l'émission du 13 décembre. Nous parlerons de l'espéranto, de son histoire, d'Esperanto-France, de ses activités, de son actualité et des projets pour 2025.

https://arts-mada.website-radio.com/

https://www.youtube.com/watch?v=-NNC17XP2ZA une émission précédente

PG iros al la intervjuo. Se lastminute li ne povas iri pro sia laboro, LPI iros.

# Zamfesto

14/12 posttagmeze ekde 14h30, 17-19 rue Traversière, Parizo, metroo Gare de Lyon.

Ĝi okazos, eĉ se okazas fervoja striko (estas minaco de striko ekde 11/12).

Respondecas RC. Organizo kun la pariza grupo de SAT-Amikaro kaj la fervojistoj.

La eniro senkostas, la nedeviga papera programo kostas 2€.

La programo estas fiksita, la komitato jam ricevis ĝin.

Komence de la spektaklo okazos sinprezento de la 3 asocioj. AK prezentos nian asocion.

Fine de la unua parto okazos prezentado de noveldonitaj libroj. SAT-Amikaro prezentos siajn eldonaĵojn. Kiu prezentos la librojn eldonitajn de Espéranto-France? LPI petos de Emmanuelle Richard ĉu ŝi pretas mem fari, se ne LPI faros.

Dum la paŭzo okazos libroservo, nia asocio ofertos librojn de Espéranto-France, kiu enkasigos la profiton. Prizorgos LPI kaj AK (pli bone esti 2 por porti vendotajn librojn) AK petos pruntepreni la pagilon de Esperanto-France.

Dum la paŭzo okazos bufedo, nia asocio prizorgos ĝin kaj enkasigos la profiton. DL aĉetos varojn ĉi-sabate, PG, RC (pli bone esti 2 por porti la varojn)

Fine de la dua parto okazos kantado de esperanta kantisto. Prizorgas nia asocio. Ni decidis elekti Armel Amiot, la kosto estas 700€ (vidu la protokolon de la lasta KK). DL pagos surloke, post kiam Armel Amiot donos al li sian fakturon.

Tuj post la Zamfesto, de 18h ĝis 19h30, okazos babilrondo por gejunuloj en nia sidejo. Ekde 19h okazos esperanto-kafejo.

La sekvan tagon 15/12, okazos tutsimpla Zamfesto de SAT-Amikaro en ĝia sidejo la tutan tagon. Poste je 17h okazos spektado de la filmo "Une langue universelle" en kinejo Le Luxy en apuda urbo Ivry, ĉeestos la reĝisoro. Poste okazos vespermanĝo en irana restoracio.

# Novjaro

AK kaj LPI sendos mesaĝojn al membroj kaj amikoj por deziri bonan novan jaron, instigi al (re)aliĝo, instigi al kandidatiĝo en la komitaton.

AK kaj LPI sendos bondezirojn al aliaj esperantaj asocioj (Espéranto-France, JEFO, fervojistoj, SAT-Amikaro...) kaj al la respondeculo pri asocioj en Paris Centre.

La nunaj komitatanoj devos anonci komence de januaro ĉu ili rekandidatiĝas.

Ĉu ideoj de homoj, kiun ni povus kontakti por proponi iĝi komitatano? Ĉiujare AL vane petas al junuloj.

DL planas transloĝigi ekde aprilo al Marsejlo, do ne rekandidatiĝos. RC ne rekandidatiĝos. AK kontaktos Marianne. LPI sendos mesaĝon en la Whatsapp grupo de la EDE kandidatoj. Ekzemple : Emmanuel Debanne, Pascal Hébert...

# Reĝkuko

Nia asocio invitos al reĝkukoj kaj trinkaĵoj. Dum la evento ni varbos por aliĝi al Espéranto-France, kandidatiĝi al la komitato, donaci monon.

Ĝi okazos la 25an de januaro je la 4a posttagmeze kaj duono, post la sabata posttagmeza babilado de RC, kiu okazos de la 2a ĝis la 4a.

La buĝeto estas 100€, PG validas. AL kaj LPI aĉetos la reĝkukojn, cidron kaj pomsukon.

# Asekuro de niaj eventoj

Prizorgas DL. PG demandos al DL, kio novas.

# Prelegturneo

Bert sendis mesaĝon: Daimi Doval Delsa kaj Miguel Ángel González Alfonso, paro el Kubo, pasigos 20 tagojn en Francio ekde la 26a de aprilo 2025 kaj pretas viziti diversajn urbojn, po 4 tagoj en ĉiu urbo, gvidante vesperon pri sia lando per prelego, kantoj, kuirarto, ktp.

En Espéranto-France, Régis Fabre estas la respondeculo pri organizo de prelegturneoj en Francio. Tiu respondeculo devas ricevi proponojn de prelegontoj, trovi interesitajn klubojn kaj plani la sinsekvajn vizitojn en la diversaj kluboj. En nia francilia federacio, la loka respondeculo pri prelegturneoj estas FLJ. FLJ resendos la mesaĝon de Bert al Régis Fabre.

# Projektoj

- Nia ŝranko: AL, nenio novas
- Finfermi la asocion Espéranto 94: AL, PG, FLJ, Sylviane plu aktivas
- Civitaj dungitoj de Espéranto-France: ĉu EF dungos ĉi-jare? nenio informo
- Kontakti mezlernejojn pri la projekto MultLingva Akcelilo: dormanta
- Animation pour les habitants dans les cours d'école de Paris Centre le samedi: dormanta
- Disdoni librojn al publikaj bibliotekoj (detaloj en protokolo KK 22/03/24): dormanta
- Ministerio pri financaj aferoj: DL, LPI, PG: dormanta
- Paĝmarkiloj: AL, necesos mendi kiam ne plu restos da
- Ĉapeloj : DJ : 647€ttc/300 → 2,16/U => 5€/U ; 40€/10 ; 150€/50 Ni validos la decidon dum la venonta KK
- Subglasoj: GVN, la prezoj ŝanĝiĝis
- Badges, épinglettes: SR, dormanta
- T-ĉemizo kun pariza urbolinio, simila al tiu de Montrealo dum la tiea UK: PG kaj SR, dormanta (pour ne pas avoir à gérer nous-mêmes le stock ni les tailles, il suffit de passer par un site de fabrication à la commande comme par ekz spreadshirt.com, qu'utilise Internacia Naturista Organizo Esperantista INOE)
- Krei videaĵon por prezenti nian asocion, ekzemple en salono aŭ ZamFesto: AL petos al Lulu Testudo

# Agadoj

- Ĝemelurbo kun Romo: dormanta, Marc Giraud rezignas
- Legoklubo: dormanta, Marc Giraud rezignas
- Junularaj agadoj: AL kun la junaj membroj, okazas ĉiumonata babilrondo 14/12, 11/01
- Informado pri ekzamenoj: FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN ĉiumonate 18/01 kun sufiĉe da sidlokoj (ĉar estos partoprenantoj de la KK-EF), facile atingebla el Bastille, sed ne ĉe Bastille kie manĝas la komitatanoj dimanĉe.
- Espéranto café croissant: GVN, aleatore
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier, AK ĉiumonate, lunde
- Prelegturneoj: FLJ

Notu bone: post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al raymonde.coquisart@yahoo.fr por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

# Respondeculoj pri informkanaloj (memore)

Informi pri niaj eventoj. La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook DL GVN https://www.facebook.com/esperanto.paris

- X (Tvitero) PG SR https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo AK https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Vacapo: AK SR (Viktoro Simonnet) https://chat.whatsapp.com/IjLHyHenBGDFOv8yPB2Xt3
- Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj: DL
- Instagramo: SR kontaktos Lulu Testudo kaj eble reprenos la konton de JEFO, kiun Lulu kreis

PG : ĉu ni malfermu konton ĉe BlueSky kaj poste ni fermu nian konton ĉe X ? Ni konsentas malfermi konton ĉe BlueSky kaj krei sistemon por aŭtomate publikigi la mesaĝojn de BlueSky en X-on. AL kaj PG prizorgos tion dum la venontaj monatoj

# Niaj retpoŝtadresoj (memore)

Adresoj kreitaj de nia federacio, administrataj de prezidanto kaj sekretario:

- komitato-francilio@googlegroups.com resendas al la komitatanoj
- membraro-francilio@googlegroups.com resendas al la membroj aliĝintaj por la jaro 2023-2024 (mane ĝisdatigota pri 24-25 por inviti al la ĜA 2025)

Adreso kreita de nia federacio:

- amikaro-francilio@googlegroups.com resendas al ĉiuj interesatoj pri niaj eventoj, iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi

Adreso kreita de Espéranto-France, ne uzita:

- francilio@esperanto-france.org iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi, vidu ĝian priskribon https://esperanto-france.org/sympa/info/francilio

Kontaktadreso de nia retejo https://esperanto.paris la resendadon administras Emmanuelle Richard:

- info@esperanto.paris resendas al la estraranoj kaj Said Baluŝi

# Venonta KK

KK kutime okazas trimestre, sed necesos kunsido en januaro por prepari la Ĝeneralan Asembleon 2025, interalie decidi ĉu eksterordinara ĜA por malgrandigi la minimuman nombron de komitatanoj. Tiam la komitatanoj devos anonci ĉu ili rekandidatiĝas.

La venonta KK okazos 13/01 19h30 rete, en la ĉi-suba reta salono:

https://us06web.zoom.us/j/88363217291?pwd=CNDefzB2qB7hZcArjshNbNdTytRjdY.1

ID de kunsido: 883 6321 7291 kodo 421828

# FINO DE LA KK